

Numero: 233.
Oktobro: 2011.

19-a jarkolekto

LITERATURA FOLIO

VESPERTO



Redaktanto:
Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefono: 82/ 410-664
Retadreso: espbela@t-online.hu
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

Ni parolu sincere!

Lingvolernanto

Fakte la angla lingvo estas pli utile uzebla, ol Esperanto en la mondo.

Se oni ŝaltas televidilon, pli rapide estas aŭdebla angle parolantoj ol esperante.

Certe tiuj ĉi frazoj estas malĝojaj por ni geesperantistoj, kiuj kredas sian lingvon.

Malgraŭ tio nun neniu pensu, la zamenhofa lingvo estas forĵetenda kaj ĝi jam mortis por ĉiam.

Mi ne intencas enterigi tiun ĉi lingvon. Ja la duonon de mia vivo ĝi plenumis kaj la Internacia lingvo kaŭzis al mi multe da ĝojo.

Tamen ni estu realaj, kaj forblovu la violkoloran nubon de super nia kapo, kaj ni komencu pensadi, kion ni povos fari por ke Esperanto okupu pli elegantan lokon inter la ekzistantaj lingvoj.

Estus bone kredi, ke ĝi ne estas nur infanludilo. Per ĝi oni povas komuniki facile kaj flue, kiel per aliaj lingvoj.

Mi mesaĝas al la adeptoj de la angla lingvo, Esperanto estas ne malamiko aŭ konkuranto de la naciaj lingvoj. Kune kun aliaj lingvoj ni povus solvi la lingvajn malfacilaĵojn sur la ter globo.

Do, neniu timu de Esperanto! Aliflanke ni geesperantistoj devas agnoski, la angla lingvo nuntempe estas pli disvastiĝinta kaj uzata, ol nia lingvo.

Pro tio ni geesperantistoj ne devas ektimi, ĉar dum pli centjara ekzisto nia lingvo jam pruvis la vivkapablon, kaj al multaj homoj ĝi plifaciligis la komunikadon. Krome miloj uzas ĝin por diversaj aferoj.

Tamen ni rigardu reale la situacion de Esperanto. Pro tio neniu lernas ĝin, ĉar eksterlande oni devigas ĝian scion.

En Hungario precipe la gejunuloj tial lernas amase angle, germane kaj ankoraŭ en kelkaj lingvoj, ĉar ili deziras labori en tiuj ĉi landoj.

Zamenhofa lingvo estas belega ideo kaj estus laŭdirinde, se ĝi estus parolata ĉie en la tuta mondo, kiel dua lingvo. Sed nun ankoraŭ ĝi ne sukcesis trarompi tiun ĉi larĝan muron, kiu malhelpas ĝian disvastiĝon.

La ideo kaj mem la lingvo plaĉas al la homoj, sed bedaŭrinde laborloke nur kelkaj el ili povas uzi.

La tasko de la sekvaj jardekoj estas por ni geesperantistoj enkonduki Esperanton ĉiun teronon de la vivo kaj rekomendi ĝian uzadon, kiel efika, facile ellernebla komunikilo.

Ĝi ne estos facila laboro, ĉar ni frontos multe da kontraŭantoj de ĝia universala disvastiĝo sur la ter globo.

--Kiun lingvon mi lernu? Tio estas por mi granda demando. Dum la tuta nokto mi meditis pri ĝi, eĉ unu minuton mi ne povis dormi pro tio. Miaj geamikoj lernas la anglan kaj germanan lingvojn. Onidire se iu scias ilin, tiam la uzanto povas komprenigi sin kie ajn en la tuta mondo.

Eble ankaŭ mi lernos tiujn. Vere mi timas de la lingvolernado, ĉar en la lernejo mi estis tre malbona lernanto. Tie mi povis ellerni nenium lingvon, kvankam la rusan mi lernis ok jarojn.

Kion mi scias el tiu ĉi lingvo? Nenion. Mi forgesis ĉion. Terure! Oni devas komuniki. Sed kiel? Mi ne havas tempon vizitadi lingvokursojn aŭ privatajn instruistojn.

Kiom da jaroj mi povus ellerni perfekte la anglan lingvon? Mia konatulo diris, ke ĝi estas ellernebla dum du – tri jaroj. Mi jam pasis tridekjara kaj mi havas familion. Mi ne povas oferti tiom da jaroj por lingvolernado.

Mi devas trovi ian pli rapidan solvon.

Kiu povus helpi al mi? Ĉu ekzistas ia rapida metodo? Estus bone, se ekzistus lingvo, kiun oni povus ellerni dum horoj aŭ almenaŭ kelkaj tagoj. kial lerni naciajn lingvojn dum longaj jaroj. Fine ilin oni ne kuraĝas uzi, ĉar neniam oni povas ellerni tiel, kiel la denaske parolanto.

La mondo estas senjusta, ĉar ekzistas multaj lingvoj, kiujn grandparte oni devus ellerni, se oni dezirus, ke ne estu lingvaj malfacilaĵoj, se oni komunikas eksterlande.

Kiom bone estus, se la mia estus mondlingvo kaj ĉiu volus kaj devus lerni ĝin. Mi envias la anglojn kaj usonanojn, ĉar ili povas ekzisti en la mondo ankaŭ sen lingvolernado. Ho, mi tute forgesiĝis pri aŭstralanoj kaj ĥindoj. Ili perfekte regas la anglan lingvon. Ĉu estus bone, se en ĉiu lando ĝi estus disvastiĝinta kaj naciaj lingvoj formortus?

Antaŭ nelonge de iu mi aŭdis, post kelkaj jardekoj en la mondo ekzistos nur unu lingvo. En la tuta mondo oni komunikos per la angla. Do, vole nevole ĉiu devos ellerni tiun ĉi lingvon.

Dio mia, kial ne la mian? Ja ankaŭ ĝi estas belega kaj belsona. Kion vi diras, ke la nia estas malfacila, kaj nur kelkaj milionoj da homoj parolas.

Kiel disvastiĝis la angla? Dume nia lando estis la ŝildo de la okcidento kaj defendis Eŭropon kontraŭ la timiga turka armeo la angloj konkeris la duonon de la mondo.

Laŭ mi nun la mondo devus akcepti nian oferton kaj rekompencante lerni nian lingvon por ke ni povu komuniki.

La skatoleto

Viro trovis skatolon sur la strato. Ĝi estis ĉiutaga, polva skatolo. Ĝi kuŝis ĉe la stratangulo forĵetite.

Unue li preteriris ĝin, sed post kelkaj paŝoj li haltis kaj rerigardis.

--Iu perdis la skatoleton – li pensis kaj reiris al ĝi – Kio estas en ĝi?

Longe li rigardis ĝin kaj per rapida movo kliniĝis al ĝi atentante, ke neniu rimarku lin.

Sed tio ne sukcesis, ĉar ĝuste venis maljunulo kaj demandis:

--Sinjoro, kio ĝi estas?

Li apenaŭ povis respondi pro la embaraso kaj ekprovis kaŝi la skatoleton per sia korpo.

--Nenio – li diris – Ĝi estas nur malgranda bagatelaĵo. Kial paroli pri ĝi?

La maljunulo estis scivolema kaj li iris pli proksimen al la skatoleto kaj fine li ekkriis:

--Ĝi estas ja skatoleto. Kiom malgranda skatolo! Kio estas en ĝi?



La viron ĝenis la rigardaĉanta maljunulo kaj sekrete esperis, ke li baldaŭ foriros.

Sed li restis, eĉ ankaŭ aliaj uloj venis kaj ili ĉirkaŭstaris la skatoleton.

--Malfermu ĝin! – instigis lin iu el la homamaso.

--Mi ne malfermas, ĉar eble en ĝi estas bombo kaj ni ĉiuj eksplodiĝos – diris la viro esperante, ke li sukcesos timigi ilin.

Kelkaj virinoj kun infanoj iom fortiriĝis de la skatoleto, sed post kelkaj sekundoj ili reiris.

Iu alvokis policanon, kiu baldaŭ alvenis, kaj jam de malproksimo laŭte li diris:

--Homoj disiĝu! For de la skatolo. Tuj alvenos la bombofakuloj. Neniu tuŝu ĝin!



Neniu ekmovis. La homoj nur staris kaj gape ili rigardis la strangan skatoleton. La policano rigore gardostaris apud ĝi kaj li atendis mute. Maljuna virino ektiris la manikon de lia uniformo kaj tremantvoĉe demandis:

--Sinjoro policano, ĉu ĝi eksplodiĝos kaj ni ĉiuj mortos?

--Karulino, trankviliĝu, se oni ne tuŝos ĝin, neniu eksplodiĝos. Onjo, mi proponas al vi bonvolu foriri

malproksimen! Tuj venos la bombofakulo kaj li forportos la bombon.

Post kvaronhoro alvenis ankaŭ la stabo de la loka televido kaj krome almenaŭ dekduo da ĵurnalistoj.

Estis bone informitaj homoj, kiuj sciis, ke la bombo metis troturaen arabaj teroristoj por eksplodigi la tutan urbon.

Pro tio erupciis vigla diskuto inter la ĉeestantoj.

--El kio vi scias, ke la teroristoj estas araboj – muĝis mezaĝa, ledmantela viro – Eble la bombo metis tien ĉi simplaj banditoj, kiuj deziras fari renverson en la urbo. Kial ĉiam timigi la urbanojn per arabaj teroristoj. Mi laboris en Egiptio kvin jarojn, kiel kelnero, kaj mi bone konas la araban animon. Ili estas la plej bonaj homoj en la mondo. Mensogaĵo, kion oni diras pri ili. La komunistoj metis tien ĉi la bombon. KREDU MIN, homoj!

--Komunistoj, socialistoj, maldekstruloj, ĉiam vi akuzas ilin. Kiom bone ni vivis en la sepdekaj jaroj. Loĝejoj konstruiĝis, kiel post somera pluvo la fungoj, tiel altiĝis la domoj el la nenio. Ni estas la adeptoj de la paco. Komprenite? Ne akuzu nin senjuste. Mi povas imagi, tian fiaĵon faras nur la dekstruloj....

Grupo da junuloj interrompis lin:

--Ni protestas. Vi faris ĝin, kial vi estis forigitaj el la potenco. Ni ne volas komunismon. Vivu nia nacio, la sendependa lando!

Ankaŭ la urbestro ekaperis kun kelkaj oficistoj el la urbodomo.

Ili ĉirkaŭiris la skatolon kaj ankaŭ ili konstatis, ke ene estas danĝera bombo, kvankam el ili neniu rigardis ĝian enhavon.

La famo rapide disvastiĝis en la urbo. Ĉiu parolis pri la bombo, kaj fine multaj homoj komencis forlasi sian loĝlokon, ĉar onidire se ĝi eksplodiĝos, nuklea nubo kovros la ĉirkaŭaĵon.

Neniu scias de kie neatendite knabeto ekaperis kaj li tuj kuris al la skatoleto. Antaŭ ol malpermesi al li, la knabeto eklevis ĝin kaj li feliĉe diris:

--Ĝi estas la mia. En ĝi loĝos mia kuniklo.

La homoj histerie komencis forkuri por ke ili estu malproksime de la stranga skatoleto, en kiu certe estas bombo. Ili provis serĉi ŝirmejon en la proksimaj domoj kaj malantaŭ la surstrataj arboj.

La knabeton ne ĝenis ilia kriegado. Li eklevis ĝin kaj portis hejmen la skatolon en kiu loĝos lia kuniklo.

La ĉeestantoj honteme rigardis unu al la alia, kvazaŭ ili dirintus:

--Mi sciis, ke ĝi estas nur ŝerco.



-Apáti Kovács Béla-

Poezio

Verdaj karavanoj de Mikaelo BRONŜTEJN

Mi eltrinkis lastan gluton
El someraj rememoroj,
Kontraŭtristan kuracilon
Iluzian, multkoloran.
Kaj ekvibris malsfereno
En etende vastaj horoj,
Kiam venis voko venta
De la verda karavan'.

Verdaj karavanoj, verdaj karavanoj
Migras ĉiujare al la verda land',
Al sinceraj sentoj, al amikaj manoj,
Prenu min hodiaŭ, verda karavan'.

Por la tempo trankviliga,
Por semajno multimpresa
Prenas min insul'espera
En la ŝtorma oceano.
La unikan verdan landon,
La insulon de l' Kongreso.
Trans la jaro, trans la vojo
Venus verda karavan'.

Mi forviŝos lantan larmon
Aŭ subitan pluvan guton
En angoro adiaŭa
Ĉe vespera vagonaro.
Prenis la kuranta tempo
La semajnon en minuton,
La minuton de l' feliĉo
En la longa, longa jar'.



Pacespero de nova speco de Erich FRIED elgermanigis Cezar

Kvazaŭ por puni la fakton,
ke la realeco
de la socialismo
en la tempo de la transiro
estas erarohava
kaj ne plenumis
kion mi esperis
mi turnu la dorson
al la socialismo
kaj ne batalu plu kontraŭ la ekspluatantojn
diras la ekspluatantoj
kaj apogas sin ĉe tio sur mian konsciencon
kiel socialisto.

Atentigante pri tio,
ke estas la ekspluatantoj
la reprezentantoj de la malnova ordo
kiuj batalas kontraŭ la socialismon
per tio ke ili hipokrite plendas pri ĝiaj eraroj
postulas kelkaj kiuj
regas en la nomo de la socialismo
ke mi ne menciu plu
eĉ per vorto
iliajn erarojn
tiom longe kiom la socialismo
ankoraŭ havas malamikojn
Kaj tamen ĝuste iliaj eraroj
estas la plej bona helpo
por la laboro
de la malamikoj de la socialismo
Tiuj eraroj ankaŭ tiam restas videblaj
se mi eĉ ne diras vorton plu pri ili
Tiukaze liverus eĉ mia silentiĝo
pruvon al la malamikoj.
Mi demandas min
ĉu la kunekzistada batalo
de socialistoj
kiuj subigas la liberan kritikon
kaj liberaj ekspluatantoj
kiuj indigniĝas pri tio
ne spite al ĉiu ŝajno
fariĝas pli kaj pli paca.



Por infanoj



Nográdi Timi La fabelo de krajono

Kaj estis kaj ne estis, iam estis skatolo da krajonoj. Kvin koloraj krajonoj loĝis en blanka paperskatolo. Ili sidadis sur la breto kaj ĝemadis, ke ili neniam estos aĉetitaj. Hazarde ili estis metitaj apud la ŝtrumpetojn, ne inter la skribilojn.

--Oni aĉetos nin nur tiam, se infaneto deziras aĉeti samtempe ŝtrumpetojn kaj krajonojn – diris la ruĝa krajono – Tiu ŝanco estas tre malgranda. Rigardu, tie ĉi ni sidadas jam depost unu semajno kaj ankoraŭ neniu tuŝis nin.

En la sekva momento knabeto staris antaŭ la breto. Li deprenis paron da ŝtrumpetoj sur kio estis ruĝa aŭtomobilo, kaj metis en la korbon de sia panjo ankaŭ skatolon da krajonoj.

--Ĉu vi vidas? Vane vi ĉagrenis, fine ĉiu krajono trovas sian mastron.



Post la pago oni portis ilin hejmen. La knabeto metis la krajonojn sur la tablon. Li portis blankajn foliojn kaj grandan skatolon, kiu estis jam plena de krajonoj, skragumoj, krajopintigiloj.

--Rigardu! – ekkriis la verda krajono – Tuj oni desegnos per ni.

--Grandioze! – ĝojegis la flava krajono – Mi jam pensis, ke mi bruniĝos pro la enuo.

La knabeto ekdesegnis. En iu tago li desegnis ruĝan aŭtomobilon kun nigraj radoj. Li kolorigis, kolorigis kaj kolorigis la flankon de la aŭtomobilo kaj subite trouziĝis la pinto de la ruĝa krajono.

--Ve, kio okazos nun? – lamentis la ruĝa krajono – Certe la desegno estos finita per alia koloro. Sed la knabeto deziris farbi la tutan aŭtomobilon je ruĝa, tial li prenis sian krajonopintigilon, kaj majstre pintigis la ruĝan skribilon. La krajono tre ĝojis, ke ĝi estis remetita en la skatolon inter la aliajn. Ĝi ne trovis vortojn por esprimi sian ĝojon. Feliĉe ĝi rigardis al la verda, blua, flava kaj nigra krajonoj.

--Verdire ĉiu krajono trovas sian mastron, sed la nia estas ankaŭ bona! – ĝi ĝojegis – Ĉi tiu knabeto

desegnas lerte kaj atentis pri siaj krajonoj – ĝi diris, kaj ĉiu krajono feliĉe ekdormis.

-tradukis: Apáti Kovács Béla-

Enigma

Divenu, al kiu fabeloj apartenas la sekvaj bildoj!



-----?



-----?



-----?



-----?

Aŭtunaj bildoj



-Apáti Kovács Béla-